

Informilo de Marto 2018

Numero 33, marto 2018

Deklaro de Universala Esperanto-Asocio okaze de la Internacia Tago de la Gepatra Lingvo, 21 februaro 2018



Roterdamo, 21 februaro 2018. La ĉi-jara Internacia Tago de la Gepatra Lingvo denove estis okazo por organizi multajn aranĝojn flanke de Esperanto-organizaĵoj tra la mondo, kaj fari oficialajn deklarojn. Solidare kun UNESKO kaj Unuiĝintaj Nacioj, la esperantistoj emfazis la gravecon liveri edukadon en la gepatra lingvo por alfabetigo kaj baza edukado, kaj substrekis la gravecon de lingvaj rajtoj. “Parolantoj de Esperanto estas konvinkitaj pri du aferoj, diris Humphrey Tonkin, UN-reprezentanto de Universala Esperanto-Asocio: “la rajto de ĉiuj popoloj uzi la proprajn lingvojn, kaj la neceson trovi efikajn kaj senpartiajn vojojn por komunikiĝi trans lingvoj.”

La mesaĝo de UEA okaze de la Tago de la Gepatra Lingvo tekstis jene:


“Okaze de la Internacia Tago de la Gepatra Lingvo, starigita de UNESKO por memori pri la riĉeco de lingva diverseco tra la mondo, Universala Esperanto-Asocio atentigas, ke, dum en iuj landoj oni atentigas pri konservado de lingva diverseco kaj utiligo de gepatraj lingvoj en la instruado, en aliaj landoj la diskriminacio kontraŭ parolantoj, kies gepatra lingvo estas malgranda kaj ne rekonata, ankoraŭ ripetiĝas, en diversaj formoj, daŭre tra la mondo.

“Rezulte, multaj infanoj estas senigitaj de la ebleco lerni en la propra lingvo, eĉ je elementa nivelo, kaj sekve suferas malavantaĝojn en siaj unuaj klerigaj jaroj.

“Tiel okazas iom post iom la malapero kaj morto de lingvoj, kaj tutaj popoloj perdas sian intelektan riĉecon – kiel atentigas multaj lingvistoj ankaŭ en la kadro de iniciatoj de Unesko. “La biologia kaj lingva diverseco estas nedisigeblaj, interkonektitaj kaj dependantaj unu de la alia. El perdo de lingva diverseco rezultas perdo de tradiciaj konoj esence necesaj por daŭripova biodiverseco, por la vivo.

“Parolantoj de la internacia lingvo Esperanto favoras la egalecon inter ĉiuj lingvoj kaj ĉiuj kulturoj, ĉu grandaj, ĉu malgrandaj. Jam de la 1950aj jaroj nia Asocio kunlaboras kun UNESKO por protekti lokajn lingvojn kaj ilian uzadon en edukado. De kiam UNESKO starigis la Tagon de la Internacia Gepatra Lingvo en 1999 Universala Esperanto-Asocio ĉiam partoprenas la agadojn per propraj aranĝoj (afiŝoj, deklaroj, kunvenoj) kaj ankaŭ en ĉi tiu jaro per materialo en pluraj lingvoj (<http://www.linguistic-rights.org/21-02-2018/>).

“La kernaj valoroj de ĉi tiu tago, la diverseco kaj la rajto de ĉiu homo paroli sian gepatran lingvon, estas ankaŭ la valoroj, kiujn la tutmonda movado por Esperanto defendas. Ni, la parolantoj de Esperanto, volas neniun lingvon malaperigi; ni volas, ke ĉiuj lingvoj plu ekzistu, en respekto de ĉies lingvaj rajtoj, kaj ke regu lingva justeco en la interkomunikado. “Esperanto estas protektilo kontraŭ la malapero de lingvoj, kiel diris s-ino Vigdís Finnbogadóttir, eksa prezidanto de la Respubliko Islando: ‘Estas jam tempo ke la diversaj nacioj komprenu, ke neŭtrala lingvo povus iĝi vera remparo por iliaj kulturoj kontraŭ la monopolema influo de nur unu aŭ du lingvoj, kiel hodiaŭ tio pli kaj pli evidentiĝas. Mi sincere esperas, ke Esperanto rapide progresos por helpi ĉiujn naciojn de la mondo.’



Amikeco trans limoj

“Malantaŭ Esperanto ne estas ŝtatoj, ekonomiaj intereso, imperiismaj strebadoj, nek popoloj, kies intereso estus la malaperigo de aliaj popoloj, ties lingvoj, aŭ akiro de iliaj merkatoj. Malantaŭ Esperanto estas bonvolaj homoj el plej diversaj popoloj, nacioj, kiuj celas justecon por ĉiuj kulturoj kaj ĉiuj lingvoj, en spirito de paco.”

La Internacia Tago de la Gepatra Lingvo ĉi-jare koincidis kun la Semajno de Internacia Amikeco, tutmonda festo kiam Esperanto-parolantoj emfazas la valoron de Esperanto kiel ilo por peri amikecon trans naciaj, etnaj kaj ideologiaj bariloj. Aranĝoj honore al la Semajno de Internacia Amikeco okazis en multaj landoj tra la mondo sub la devizo “Amikeco trans limoj.”

UEA organizis trejnajn seminariojn por UN-reprezentantoj en Novjorko

Novjorko, 27 januaro 2018. Kiel parton de sia serio de trejn-seminarioj, la tielnomataj AMO-seminarioj, Universala Esperanto-Asocio lastatempe organizis unutan sesion por helpi lokajn Esperanto-parolantojn kiuj interesiĝas pri Unuiĝintaj Nacioj reprezentanti la Asocion kaj la Esperanto-movadon en kunvenoj kaj agadoj de UN. La seminarion gvidis Sara Spanò (Italio), estrarano de UEA pri eksteraj rilatoj, kun helpo de Franceso Maurelli (Italio), vicprezidanto de TEJO, Rakoen Maertens (Belgio), kiu aktivas en sia nacia asocio pri UN kaj en UNESKO, kaj Humphrey Tonkin, reprezentanto de UEA ĉe UN.

Deklaro de Universala Esperanto-Asocio okaze de la Tago de Holokaŭsta Memoro

27 januaro 2018. Ĉiujare la 27-an de januaro Unuiĝintaj Nacioj rekonas la Tagon de Holokaŭsta Memoro, la tagon de la liberigo de la ekstermejo Auschwitz-Birkenau kiun starigis la Nazioj kiel parton de sia programo de genocido. Temas pri tago de funebrado, ĉiujara promeso neniam forgesi tiujn kiuj mortis nek la monstrecon de la genocido kiu detruis ilin, kaj tago kiam la popoloj de la mondo estas alvokataj eldiri la vortojn “Neniam Plu” – neniam plu oni permesu ke tiaj barbarismaj agoj okazu.

La Esperanto-movado aparte funebras tiujn kredantojn pri internaciismo kaj internacia kompreniĝo kiuj, ĉu pro sia raso ĉu pro siaj politikaj aŭ aliaj konvinkoj pereis je la manoj de la Nazioj. Inter ili estis ĉiu rekta familia posteulo de L.L. Zamenhof, fondinto de Esperanto, escepte de unu sola transvivanto – kaj inter ili estis multnombraj esperantistoj en Germanio, Pollando, Hungario, Ĉeĥoslovakio kaj aliloke. Ili inkluzivis esperantistajn ŝtatoficistojn, instruistojn, kuracistojn, ĵurnalistojn, poetojn. Kaj inter la travivantoj estis ankaŭ esperantistaj herooj kiuj ŝirmis aliajn for de ekstermiĝo.

Temas ankaŭ pri tago kiam ni memoras tiujn kiuj ne rezistis aŭ ne povis rezisti tiun tiranecon kaj buĉadon; kaj ni promesas, antaŭ la ekzemplo de la Holokaŭsto, kontraŭstari maljustecon kie kaj kiam ajn ĝi okazas. Ni eble memoras la vortojn de la esperantista poeto Leen Deij, kiu en 1948 esprimis sentojn kiuj rilatas al ĉiuj gentoj kaj ĉiuj religioj.

Al la juda foririnto

Li fermis la kofron, manpremis – adiaŭ!
Sen ia protesto li iris... Hodiaŭ
mi tion komprenas; li povis nur miri,
ke mi, la kristano, lin lasis foriri.

Kun kapo klinita la kofron li portis.
Li iris la vojon al Auschwitz kaj mortis
sen ia protesto... Li povis nur miri,
ke mi, la kristano, lin lasis foriri.

Kaj iam la filo kun filo parolos,
kaj tiu demandas, la veron li volos.
La mia silentos... kaj povos nur miri,
ke mi, la kristano, lin lasis foriri.

Ni sentis kompaton kaj monon kolektis,
dum kelkaj el ni la infanojn protektis.
Sed Auschwitz ekzistis! Nu, kion plu diri?
Ke mi kaj ke vi... ni lin lasis foriri.

La dana asocio por UN emfazis lingvajn homrajtojn

Kopenhago, 20 decembro 2017. Dank' al la interveno de nia komitatano Ileana Schrøder, la Dana Asocio por UN aldonis la demandon de lingva egaleco al la ĉapitro pri homaj rajtoj en sia nova Principa Programo. “Ĝeneralaj egalrajtoj, ankaŭ koncerne lingvojn, estas grava ŝirmo kontraŭ sektecaj sintenoj,” laŭ la nova programo. Ni aparte ĝojas noti tiun ĉi atenton al lingvoj kaj rajtoj, temo ofte ignorata en diskutado pri homaj rajtoj.

NOTU LA DATON!

Simpozio pri multlingvismo en internaciaj organizaĵoj kaj internacia kunlaboro okazos la 10-an kaj 11-an de majo

Novjorko, 28 februaro 2018. Lingvoj kaj lingvaj diferencoj estas dimensio ofte subtaksata aŭ ignorata dimensio en la efikeco de Unuiĝintaj Nacioj sur multaj kampoj – de administrado ĝis ekonomia kaj socia evoluigo, de packonservado al diplomatio, kaj en multaj ceteraj terenoj. La Studogrupo pri Lingvo kaj Unuiĝintaj Nacioj, fondita parte laŭ iniciato de Universala Esperanto-Asocio, organizas jam de kelkaj jaroj ĉiujaran simpozion pri aspektoj de lingvoj en rilato al UN. La ĉi-jara simpozio, “Multlingvismo en internaciaj organizaĵoj kaj internacia kunlaboro,” okazos jaŭdon kaj vendredon, la 10-an kaj 11-an de majo, ĉe 777 United Nations Plaza, Novjorko, komence je la 9-a horo la 10-an de majo.

Multlingvismo en internacia kunlaborado enplektas kaj kostojn kaj avantaĝojn: kostojn ĉar ĝi necesigas mekanismojn kiel ekzemple selektadon de multlingvaj stabanoj kaj intervenon de profesiuloj pri lingvoj; avantaĝojn ĉar, se efike mastrumate, ĝi kunigas ĉiujn partiojn en decidado, antaŭenigas interkonsenton, subtenas programan liveradon, kaj faciligas dissemadon de rezultoj. Sekve ĝi favoras socian justecon kaj inkluzivon. Ĉiam pli ofte, oni rigardas multlingvismon kiel pozitivan forton, kvankam la diversaj partioj ne ĉiam tiel rigardas ĝin.

Ene de Unuiĝintaj Nacioj, ekzemple – precipe pro manko de alirebla dateno, proponantoj de multlingva lingvopolitiko ofte frontas ideologian, financan kaj administran reziston, spite al la kreskanta rekono, ke multlingvismo, kiel kerna valoro de UN, estas potenciala fonto de forteco.

La nuna simpozio celas atentigi pri tiuj demandoj kaj kreskigi interesiĝon pri ili. Kontribuaĵoj pritraktos la defiojn de subtenado de multlingvismo en organizaĵoj kaj en lokoj de internacia kunlaboro trans malsamaj sektoroj (ekzemple komerco, diplomatio, ekonomiko) aŭ komunumoj. Inkluzivitaj estos teoriaj kaj metodikaj studoj, kune kun tiuj kiuj frontas specifajn praktikajn defiojn – precipe referaĵoj kiuj rekte fokusiĝas je la laboro de la UN-sistemo kaj aliaj internaciaj institucioj, aŭ esploroj kun evidentaj implicoj al ilia laboro. La ĉefparolanto en la simpozio estos la konata ekonomiisto kaj lingvisto Michele Gazzola (Humboldt-Universitato, Berlino).

Por pliaj informoj pri la simpozio, aŭ por aliĝi, iru al www.languageandtheun.org. Ĉe la retejo oni povas ankaŭ legi la finan raporton de la simpozio de 2017, pri “Lingvo, la Celoj por Daŭripova Evoluigo, kaj Vundeblaj Homgrupoj.”

Oficejo por rilatoj kun UN, Universala Esperanto Asocio

777 United Nations Plaza, New York, NY 10017.

212-687-7041

www.esperantoporun.org

Office of the Universal Esperanto Association at the United Nations

777 United Nations Plaza, New York, NY 10017.

212-687-7041